1-a Jaro, N-o 26 APERAS S.A.T. SEMAJNE 26. Marto 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

# SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Gvidanto: E. LANTY
24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI.

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

## La ŝanĝoj en la politika mondbildo

Kiam antaŭ duona jaro ni elpaŝis al la sennacieca popoleto kun la unua numero de "Sennaciulo", ni konsciis ke la alteco de nia idealo, la kuraĝa malkompromisema suprenflugado svenigos, ŝancelos, malekvilibrigos kelkiujn, kiuj ne ŝatas la malkutimon, la sentradiciecon, la Novon. Tamen ni nur marŝas per paŝetoj, ne perdas dum flugado el nia vidpovo la solidan teron, tiun malvastan, kaĝecan spacon, en kiu devas suferi dum tagoj kaj noktoj, jaron post jaro, multaj milionoj da kunfratoj. Nia ĝisosta malamiko, la naciismo en multvariaj ĝiaj formoj kaj aperaĵoj, vivas ankoraŭ sian putrecan vivon, vigliĝas jen sub tiu, jen sub alia masko, blufante, stultigante, trompante — fidela amiko de l' kapitalo. Dum tiu pasinta duonjaro, dum kiu ni per semajna gazeto havis pli fortajn ŝancojn plenumi niajn taskojn, servi al la batalanta proletaro, la bezono por tiaj faktoroj, kiaj estas SAT kaj "Sennaciulo", estis pli granda ol iam ajn. Dum tiu duonjaro en ĉiuj landoj, en tuta mondo la kapitalismo provis refortigi siajn poziciojn, kaj kun ĝiaj ekonomiaj (ŝajn)sukcesoj, kun tiu restariĝo de ĝia aŭtoritato en multaj landoj, kie ĝi estis perdinta sian influon dank' al la bankrotiga mondmilito — ankaŭ restariĝis ĝia ideologia bazo — naciismo. Nacia fiereco, nacia kulturo, naciaj zeppelinoj, naciaj profitinteresoj — jen la A kaj O de l' burĝa klaso. Kaj nia tasko — ĉie tie, kie tiu A kaj O penas enpenetri laboristajn mensojn, klopodas putrigi socialistajn rondojn (anstataŭ ke la malo okazas per la kunpuŝiĝo), enradikigi la homan kunfratigan ideon pri sennacieco, kiu fortigos la batalantajn kamaradojn en ilia agado, firmigos ilin en la konvinko pri la venko.

Ĉu ni citu kun kontentula mieno tiujn sukcesojn, kiujn ni atingis dum tiu lasta periodo por SAT kaj ĝiaj ideoj, la favoran sintenon de l' Transportlaborista Internacio, kiu ligiĝas al la nomo de k-do *Nathans,* la komprenemon de l' britaj sindikatestroj rememorante la favorajn parolojn de k-do *Purcell*, aŭ la eĥon, kiun trovis nia agado en la Sovet-Unio, konsiderante la atentindajn juĝojn de k-do *Lunaĉarskij* kaj lastdate de famaj k-doj *Krasin, Sosnovskij* kaj de aŭtoroj kiel *Erenburg* kaj *Tousseul?* Ne, prefere ni pripensu kiom ankoraŭ estas farenda, por ke ĉiu proleto, ĉiu simpla laboristo sciu taksi la rolon, kiun ludas nia ideo, nia lingvo en la klasbatala movado.

Kion do ni travivis kaj travivas? Ĉu nacioj ekstaris unu kontraŭ la alia? Ĉu okazis nova buĉado inter nacioj, inter popolaroj? Ho, ne, milda "paco" sunbrilis super la eŭrop-amerika mondo, kaj nur la armilbruo en Malproksima Oriento ĝenis tiun idilion, memorigante nin pri la ekzisto de militoj. En

### Okcidento

la surtabligo de l'Davesa plano ŝajnis enkonduki periodon de eterna paco kaj de perfekta humaneco. Kune kun la dolĉaj paroloj pri paco penis restabiliĝi la kapitalista sistemo. Ameriko, la granda kreditoro, havis senton de malkomforto po sia "premanta" kreditora rolo, kaj ne malpli malkomforte sentis sin la ŝuldantoj. Germanio subskribis la pagkondiĉojn kaj ne rikoltis dankon. La suno de Daves nur por mallonga momento varmigis la ruinigitan korpon de tiu regno, nur por mallonga momento lulis en kontentecon kaj trankvilecon la laborularon. Dum nuna horo la belaj iluzioj jam disŝiriĝis, la vualoj estas fortiritaj, kaj la nuda kapitalista realeco malkovriĝas, monstra kaj mortiga kiel ĉiam. En "Sennaciulo", en la tagaj gazetoj amasiĝas la raportoj alarmaj pri nova granda mizero, novaj strikoj, novaj bataloj, — ne nur en unu lando, ne nur en Germanio, la baza problemo de l' resaniĝema kapitalismo, — ankaŭ en Francio, en Anglio, en Svedio, kaj kien ajn ni turnas nian rigardon, leviĝas proletoj por obstini la mizeron ne forigitan per la Davessolvo. Estas rimarkinde, ke ĝuste la fervojistoj, kiuj estas la plej senperaj sklavoj de Daves kaj kiuj sentas la efikojn de l' Daves-plano plej draste, — en la plano ja la fervoja afero estas traktata kun plej distingita zorgemo — estas la unuaj, kiuj batalas. La striko kiu jam daŭras kelkan tempon, nur povas esti signalo por la aliaj sklavoj, skui de siaj dorsoj la malindan jugon de netolereblaj ŝarĝoj. En Francio la poŝtistoj komencis kuraĝan strikon, en Grekio la fervojistoj batalas en malfacilaj kondiĉoj. En Anglio oni preparas la fervojistan batalon, kiel respondon al plimalaltigo de salajroj. Signoj, ke laboristaro ĉiulanda nek volas nek povas toleri la mizerajn kondiĉojn. Pasivan rezignon, kiu montriĝis dum lasta jaro en vasta amplekso ĉe laboristaro, sub influo de pacpromesoj kaj pacŝancoj, — dumdaŭre ne konas la proletaro. Ĉiam denove ĝiajn klasajn instinktojn incitas la netolerebla premego de l' kontraŭulo. — En

### Oriento

klariĝis nova situacio de la fortrilatoj. Ni sekvis en "Sennaciulo" la evoluon de tiu nova situacio, ni esploris la kaŭzojn de la konflikto "intern-ĉina", kiu estis tipa *kolonia* milito, gvidata pro la rabademo de la brita, amerika kaj japana imperialismoj. Dank' al

la rivaleco de l' potencaj konkurantoj la Sovet-Unio restis venkinto en tiu lukto. Ni vidas kiel sekvon la kvankam ne firman, tamen realpotencan interligiĝon de Sovet-Unio, Japanio kaj Ĉinio, kiu alarmis la tutan eŭropan kapitalistmondon. Pli klare ol iam elmontriĝas la kontrasto inter la brita imperialismo kun ĝiaj sklavkolonioj, sur kiuj ĝi apogas sian tutan forton, kaj — Sovet-Unio, kiu koncentrigis sian pezoforton je la liberigo de tiuj koloniaj sklavoj.

Kaj inter Okcidento kaj Oriento baraktas la

**Bufraj ŝtatoj**

regataj de nepopularaj ministraroj dungitaj de l'Antanto: Polio, Litovio, Estonio, Latvio, Bulgario, Rumanio, Jugoslavio, Ĉekoslovakio, Finnlando. Tie la klasbatalo akceptis plej akrajn formojn. Ankoraŭ batalas malvenke la laboristaj kaj kamparanaj masoj kontraŭ siaj subpremantoj, ankoraŭ oni perforte baras al ili la naturan aliĝon al Oriento. Per bestecaj rimedoj, per dungitaj murdistaj bandoj oni provas sufoki la leviĝantan movadon. En Bulgario la protagonistoj estas mortpafataj atence sur stratoj dum hela tago, en Estonio la mortkondamnoj de laboristoj ankoraŭ ne finiĝis, en Albanio oni ekzekutas la kontraŭulojn de nuna faŝista reĝimo, kaj eĉ en malproksima Ĉilio (Sudameriko) oni kaŝe mortpafis maljunan laboristgvidanton.

Per tiaj rimedoj nur laboras pereanta klaso. Sed nia tasko estas, plicertigi la venkon de novsocianoj, edukiĝante mem kaj edukante aliajn por la Novo. La interfratiĝo de proletoj de unu lando al alia ne estu nura frazo en la buŝoj de oratoroj, sed ĝi fariĝu reala faktoro. Nur tiam ni povas kun trankvileco kaj konfido ekiri al la novaj bataloj, kiuj prepariĝas en la proksima estonteco. *N. B.*

# La nuntempa sklavkomerco

En Varsovio gastis antaŭ kelkaj tagoj ministro de laboro de franca respubliko s-ro Justin Godart.

Por multaj civitanoj de nia ŝtato alveturo de s-ro Godart ne estis ia ajn bagatela okazaĵo. Ĉar ili ne opiniis, ke en Francio, aŭ ĝenerale en ia ŝtato, okcidente, ankaŭ ekzistas tute nebezona ministraro. Ili opiniis, ke nur Polio, dank' al tio, ke ĉe la sojlo de sia revivigita ekzisto ĝi havis mallongan periodon de „Moraĉevskimo" 1) portas ĉi-nebezonan balaston. Dume ekzistas io simila ankaŭ en Francio. Kiu supozus tion!

Sed ni returnu nian atenton al s-ro Godart.

1) Moraĉevski regis du jarojn per la "sieĝa stato" kontraŭ laboristaro. Red.

La celo de alveturo de franca laborministro estis subskribi "elmigran konvencion" pole-francan.

Kion signifas ĉi du vortoj; "elmigra konvencio"? —

Detruita dum la mondmilito Francio, havanta tutajn departementojn ruinigitajn, febre estas rekonstruanta. Ĝi rekonstruiĝas tiel rapide, ke mankas laboristmanoj por efektivigi ĉiujn planitajn laborojn. Estus eble ja ĉi-laborojn dispartigi por multaj jaroj, sed Francio rapidas. Ĝi ne volas atendi, ĝi ne havas tempon. Fine ankaŭ ne havas tempon Germanio, Belgio, Aŭstrio, Italio kaj Rumanio, kiuj rapide riparas malutilojn kaŭzitajn de la milito.

Polio ankaŭ estis ruinigita dum la milito kaj ankaŭ havas dezertigitajn distriktojn kaj urbojn ĝisfunde detruitajn, sed ĉe ni oni ne rapidas. Ĉe ni oni havas tempon. Oni senkulpigas sin per facila argumento, ke estas malfacile postuli de

**Por 32 dolaroj da akcioj**

por nia kooperativo aĉetis la

**SAT-anoj de Taŝkent**

dank' al la fervora agitado de

nia k-do **Kuzin (4417).**

**Kiu imitas?**

unu generacio rekonstrui detruitan laboron de kelkaj generacioj. Do oni havas tempon kaj zorgante pri infanoj kaj nepoj kaj pranepoj, por ne senenergiigi ilin per senageco, oni lasas al ili laboron, kiun oni mem devus plenumi. Tial, kiam en Francio oni sentas mankon de laboristmanoj, ĉe ni la nombro de senlaboruloj ĉiumonate pliiĝas 2).

Dum sama tempo la registaro de lando, kiu havas nek tempon, nek manojn, sin turnas al registaro de lando, kiu havas multe da manoj kaj ankoraŭ pli da tempo kaj diras: Donu al mi ciajn liberajn laboristojn.

— Ĉu ci multe bezonas?

— Nu, ni diru, provizore ĉirkaŭ centmil parojn da manoj.

— Multe.

— Multe, nemulte — ja vi plene egale neniom profitas de ĉi-senlaboruloj, kontraŭe, ankoraŭ al ili vi iom pagas.

Jen la konvinka argumento. Du registaroj eksidiĝas ĉe la tablo kaj skribas "elmigran konvencion".

De longe, tre longe, kiam homo povis esti propraĵo de alia homo, ankaŭ okazis

2) Oni komparu la raporton pri situacio en Francio aperintan en n-o 25. Red.

aĉetkontraktoj — vendado de homoj. Ĉe tablo eksidiĝas du romaj patricioj, — aŭ pli malfrue — du amerikaj plantistoj, kaj unu al alia vendadas aron da vivkomercaĵo. Oni nomis tion tre malbele: sklavkomerco, sed ĝi havis multajn bonajn flankojn. Roma patricio aŭ amerika plantisto devis prizorgi sian hom-inventaron same, kiel li zorgis pri siaj ŝafoj, ĉevaloj, bovoj kaj azenoj, por ke ĝi estu ĝustatempe nutrita, por ke ĝi havu per kio kovri sian pekan korpon, por ke ĝi havu tegmenton super la kapo ktp.

Morto de sklavo estis materiala malprofito, same kiel morto de bruto.

Kun civilizaciprogreso homo — sklavo emancipiĝis.

Li liberiĝis tiurilate, ke nune li mem devas zorgi pri nutraĵo, pri vestaĵo kaj pri tegmento super la kapo, ankaŭ pri milo da aliaj bezonoj, kiujn antaŭe li ne konis. Sed li ne ĉesis esti *sklavo*. Vere nenia plantisto aŭ patricio (hodiaŭ ili nomiĝas bienulo kaj aristokrato) povas lin nek aĉeti nek vendi, sed malgraŭ tio ne malpli li restis kaj estas sklavo de organizita kapitalo, kiu se ĝi emas donos al li laboron, do tiamaniere la manĝaĵon, vestaĵon kaj loĝejon, aŭ, kiam ĝi ekdeziros, sendos lin al Francio dank' al . . . elmigra konvencio. Trad. el "Walka" (Batalo) Halpern.

# La komercado de Polio kun eksterlando

Dum la tri sezonoj de pasinta jaro importo el eksterlando al Polio estis elkalkulata de ĉefa statistika Oficejo je 1 003 861 000 zl. p. kaj eksporto je 896 291 000 zl. p. Tiuj-ĉi ciferoj montras al ni, ke importo superas eksporton en ĉi-periodo je 107 570 000 zl. p. La plej grandsumaj spezoj rilatas sekvantajn landojn:

| | Importo | Eksporto |
|---|---|---|
| | en miloj da zlotoj p. | |
| Germanio . . . . . | 340 965 | 373 738 |
| Aŭstrio . . . . . . | 119 784 | 94 004 |
| Anglio . . . . . . | 73 865 | 83 908 |
| Usono . . . . . . | 117 742 | 4 763 |
| Ĉekoslovakio . . . . | 55 846 | 63 682 |
| Francio . . . . . . | 52 338 | 43 416 |
| Rumanio. . . . . . | 12 007 | 61 104 |
| Italio . . . . . . . | 56 996 | 4 066 |

Krom tio Polio ankaŭ komercas kun Belgio, Danio, Nederlando, Litovio, Latvio, Sovet-Unio, Svisio, Svedio, Hungario kaj aliaj landoj, sed tiu komerco estas tre malgranda.

Kun Sovet-Unio lastan tempon pola registaro ĝenerale volas iamaniere ekfratiĝi, ĉar ili timegas estontan invadon flanke de germanoj pro revenĝo. Ĉu la ekfratiĝo efektiviĝos, montros al ni estonteco.

*H. H-n.*

## Fondo de Internacia Trusto por inkandeskaj lampoj

Ni legas en franca ĵurnalo „L'Usine“ 1) (La uzino) sekvantan informon:

“Fondo de tiu trusto estis sufiĉe facila, ĉar industria koncentriĝo pri tiu komercaĵo jam estas tre progresinta en ĉiuj landoj: la firmoj “Osram-Gesellschaft“ en Germanio, “Westinghouse“ kaj “General Electric Company“ en Ameriko, “Compagnie des lampes“ en Francio, “Philipps“ en Nederlando estas regintaj sur la merkato. Jam antaŭ la milito, germanaj kaj amerikaj societoj estis interŝanĝantaj siajn patentojn pri inventoj kaj siajn produktajn rimedojn. Nun la teknika supereco de la firmoj “Auer“ kaj “Philipps“ certigas al ili privilegion inter hispanaj, norvegaj, ĉeĥoslovakaj, polaj, svisaj k. c. societoj kie ili havas interesojn.

Tiu trusto celas sisteman interŝanĝadon de patentoj inter ĉiuj siaj anoj kaj organizadon de la vendado en la diversaj regionoj . . . ktp. . .“

Do, laboristoj ĉiulandaj, miaj fratoj, ne miru kiam vi pagos por inkandeskaj lampoj multoble ilian fabrikkoston.

Sed ĉiam memoru, ke same kiel la lampfabrikantoj, *la ĉiulandaj laboristoj havas la samajn interesojn.*

*Robert Soudant* (140).

## Kontraŭ militservo

El Belgio skribas al ni k-do: Indigna atenco kontraŭ la libereco de konscienco prepariĝas unuan fojon en Belgio. Unu junulo kiu devas esti soldato, rifuzas militservi. La sentimento de lia konscienco malpermesas al li eklerni la armilmetion. Li baldaŭ aperos antaŭ la milittribunalo, por pravigi sian vidpunkton, sian fundan honestecon, sian religiecan fidon al la pacidealo. Malliberejo kaj rigora militist-disciplino penados frakasi tiun noblan volon. Ĉu belgaj kamaradoj sin montros malsenteblaj je tiu sinofero? Ĉu ili, senproteste, ne prenos la partion de l' honestulo, lasos sufoki la veron? Ĉar tiu kontraŭmilitaristo, socialista, kristana, rifuzas lerni metion, kiu devigus lin mortigi. Tiu rifuzo estas ekzempla manifesto de grandega kaj nobla konscienco, manifesto pro la fundamenta rajto de konscienc-libereco. Tiu rajto ne povas perdiĝi. — Milittribunalo ne haltos antaŭ ĝi. Milita punjusteco trudiĝos en sia tuta forto, kaj denove unu senkulpulo enskribos sian nomon en martira libro de konsciencliberec. — Defenda komisiono estas urĝe konstituciita, por defendi tiun junulon kaj samtempe defendi grandan ideon de paco kaj frateco, je kies realigo ni laboras.

*F. Rondelet, Marchin.*

1) *L' Usine:* organo de famekonata franca “Comité des Forges“ (ĝenerala asocio de l' metalindustriistoj).

*El la sama ĵurnalo:* “Mastraro ne inventis klasbatalon, ĝi konstatas ĝin kiel bedaŭregindaĵon.“

Cu oni povas kredi, ke ekzistas ankoraŭ proletoj, kiuj rifuzas eĉ konstati klasbatalon, kaj penas efektivigi klaskunlaboradon? Ve!

Ni pruvu al ili, ke (laŭ vorto de la franca eks-ĉefministro ŝakalo Clemencó) inter burĝaro kaj laboristaro temas nur pri trudperforto.

*R. S.* (140)

## Marksana analizo de moralo

En januaro, en Moskvo, okazis publika diskuto pri moralo, analizata de l' marksana vidpunkto. La raportanto — popola komisaro por klerigado, — k-do Lunaĉarski donis tre interesan analizon pri moralideo, tiom diferencan de klasika esencdifino de burĝaj moralistoj. Kio estas moralo laŭ vasta senco de l' vorto? — per tiu demando komencis sian raporton unu el la gvidantoj de ruslanda proletaro.

— Ĝi estas normaro, reguliganta interhomajn rilatojn, kompleto da homaj sentimentoj kiuj aprobas aŭ malaprobas la propran konduton, — la interna verdikto de l' konscienco, kiu komprenigas al la homo, kio estas bona, kio — ne.

Post profunda analizo de la historia evoluo de burĝidea moralo, — de E. Kant kun lia kategoria imperativo ĝis rusa publicisto Ĉernyŝevski, — k-do Lunaĉarski transiris al la moralo formuligenda de l' marksana vidpunkto, asertante, ke nur marksismo eltrovas ĝustalokan vidpunkton rilate al signifo de l' homa persono, — la klaskonscian vidpunkton, laŭ kiu la homa persono estas konsiderata kiel produktaĵo de l' epoko, de tiu socio, en kiu ĝi vivas, estas edukata per klasa medio por klasaj celoj. La moralo ĉiam formuliĝas konforme al klasaj interesoj.

La etburĝan filozofion de amoralistoj, kiuj la volon de l' individuo konsideras antaŭ ĉio, marksismo anstataŭas per kolektivismo, kiu celas al la plej perfektaj organizaj formoj de l' socio.

Kaj de tiu ĉi punkto la proletaro estas la plej normaleca klaso, kaj ĝisnuna historio konis nenian klason tiom moralecan.

Marksismo diras: la moralo estas necesa, kiel reorganizilo de l' homa socio, kiel agilo de l' kolektivismo, kaj la proletaro devas “elforĝi“ ĝin por laŭ ĝi rektigi sin kaj la aliajn.

La fundamento de proletara moralo estas kolektivismo, — ĉio por la klaso. Ĉio, kio akcelas la triumfon de l' klaso, estas bono; kio — ĝian malvenkon, tio estas malbono. Proletaro estas progresema aktivularo de l' homaro; ĝi, kiel klaso, estas destinita por servi al la tuta homaro, ĝi devas prizorgi ĉiujn sklavigitojn, — jen estas fundamento de l' proletara moralo. La absoluta submetiĝo de l' individuo al la klasaj interesoj, — “ĝi estas klaso, dum mi estas nur homo“, — jen estas fundamenta principo de l' proletara moralo, per kiu klasaj kaj tuthomaraj interesoj kunfandiĝas. Oni asertas pri komunistoj, ke ili per partia disciplino katenas libereman kaj kreivan penson de l' individuo, senpersonigas ĝin. Tio ĉi estas malvero. La partio ne katenas la kreivan penson, ĝi ne estas jungilo por la penso, sed ties gvidanta lumturo, ĉirkaŭ kiu koncentriĝas la plej bonaj fortoj de proletara kreado. Ni absolute fidas al ĝi kiel produktaĵo de l' kolektiva kreado.

Konklude k-do Lunaĉarski tuŝis la demandon pri seks-moralo, refutante la mensogaĵojn de l' burĝaj kritikistoj pri tio, ke la proletara moralo malagnoskas la belon, amon, patrinecon ktp.

La amo estas natura emo de unu sekso al la alia; ĝi estas la plej altgrada elmontriĝo de l' homaj sentoj, de l' spirita entuziasmo, kaj de tiu ĉi vidpunkto marksismo konsideras ĝin, kaj aserteble, eĉ pli serioze ol la burĝa filozofio.

Sed la amo devas esti libera sen havi ian ajn povon por sklavigi unu volon sub la alian.

La marksistoj agnoskas absolutan egalrajtecon de l' seksoj en demandoj de l' amo; tion ĉi oni ne devas identigi kun seksa maldisciplino. Ni ne estas cinikuloj: sekse uzi la knabinon, amuziĝi kun ŝi dum 1—2 monatoj kaj poste forlasi ŝin malgraŭ eventualaj postsekvoj, — tio ĉi ankaŭ de l' proletara vidpunkto estas malnoblega.

Oni devas rilati al l' amo plej delikate, memorante, ke en tiu ĉi sfero de l' homaj interrilatoj oni plej facile povas malutili al la homo. La patrineco estas unu el la plej altaj ideoj; la amo al la infano estas realaĵo de l' belo, preter kiu oni ne povas iri indiferente.

Ni tute ne akcelas la ruiniĝon de l' familio, ĉar oni ne povas nun anstataŭi ĝin, ĉar kiel fundamenton de nia moralo ni havas la ideon de tuthomara feliĉo.

La proletara moralo, trembrilanta per ĉiuj kolornuancoj de l' vivo, estas ekzemplo de tio, kiel oni devas vivi dum la luktado por organizo de la plej perfektaj kolektivaj formoj de l' homa socio. Ĝi estas ne malagnoskado, sed konkreta elmontriĝo de la plej altaj formoj de la belo kaj homa spirito.

La interesa kaj aktualtema raporto de k-do Lunaĉarski estis kunveniginta amason de l' publiko, kiu ne povis eniĝi en la kunvenejo, havanta nur 4000 sidlokojn.

*N. Krassovski.*

## Grave!

Societo “Laborista Solidareco“ (Kremenĉug) petas k-dojn el ĉiuj landoj alsendi (laŭeble) rezoluciojn, favorajn al Esp-o voĉdonitajn dum la periodo 1917—1925 de komunistaj organizaĵoj regionaj kaj landaj, same de ruĝaj sindikat-organizaĵoj diversaj (sindikatoj, laborkonfederacioj ktp.). —

La suprenomitaj materialoj estas necesaj por mencio aŭ publikigo en propagandilo eldonota.

Sendu ĉion al: “Laborista Solidareco“

*V. Kolĉinski — Kremenĉug* (Ukrainio)

# DISKUTEJO

## Dawes-projekto[1]

(Respondartikolo)

Mi tuj komence citas elparolon pri ĝi de ekonomia spertulo bolŝevika, profesoro E. Varga. Li skribis en la moskva Pravda la 15. aŭg. pasintjare: "La efektivigo de la Dawesprojekto fortigos la tendencojn demokrati-pacifistajn en ĉiuj landoj je ĝi partoprenantaj. Ni vidas disfali la faŝismon germanan kiun nun la burĝaro germana ne plu bezonas." Kaj pri la sekvoj de la projekto: "La kreskado tiel de la laborista partio (angla) kiel ankaŭ de la maldekstra bloko franca kaj de la socialista partio germana daŭros. La efektivigo de la Daw. proj. ŝirmos la industrion germanan kontraŭ nova krizdanĝero, ĝi plilongigos la periodon de la stabileco germanmarka. Tial ĝi prokrastas la ripeton de la akuta situacio revolucieca de la jaro 1923."

Nu, mi supozas, se tiu projekto tiom gravas, mi certe rajtis kiam mi klopodis analizi ĝin kaj tion simile al k-do Revo, nur kun li diferencinte en la vidpunktoj. Mi intence limigis min je nura teknika enhavo ĝia, ĉar mi nur volis korekti kelkajn porpropagandajn erarojn. Ĉu mi vere nur pritraktis akcesorajon, pri tio mi ne volas disputi kun k-do 1187. La plua riproĉo liaflanke estis ke mi estas forgesinta la ĉefpunkton de la proj.: ĝin rigardi proletmense, t. e. paroli pri ĝiaj sekvoj por la laboristaro kaj priskribi la situacion nunan kiu rezultas el ĝi por la proletario.

Mi volonte volas ripari tion tiomgrade kiom al mi permesas mia "diletantismo marksa". Tiajn kaj similajn moke interĵetitajn vortojn k-do 1187 certe estus povinta eviti se li estus disponinta pri kelkaj ecoj memkompreneblaj por homo kiu penas ekestigi la estonton. Homo por estonto batalanta estimas eĉ kontraŭopiniulon, konsideras liajn argumentojn kaj honoras la objektivon kiel la plej alta pensmaniero.

La pordaŭra ordigo de la devigoj rezultantaj el la Daw. proj. kaj la projekta vivkapableco mem, ne konsiderante la influojn ŝancelantajn de mondmastruma origino, estas decidotaj inter la du grandaj klasoj, kapitalo kaj laboro, en propotenca batalado. K-do 1187 pridubis la samgrandecon de la du klasoj parolinte pri koncentriĝado kaj gigantamasiĝo de la kapitalo en ĉiam malpli da manoj, kaj li citis samtempe tiurilate elparolojn de Marks. Malgraŭ ĉio mi kontraŭstaras al tio ke ĝis nun tute ne estas atingata tiela disvolviĝgrado kiel volas kredigi k-do 1187, t. e. unuflanke la kapitalo kiu koncentriĝas en malmultaj manoj, aliflanke la proletaro en nenombrebla amaso. Ho ne, la du interligiĝas unu kun la alia tre intime per la vasteco de la tiel nomitaj enmezaj tavoloj: metio, komerco, etindustrio kaj etekonomio. Proksimume la tuta intelektularo pliigas ilin. Kaj se por tiuj tavoloj ankaŭ la sinriĉigeblo ĉiam malgrandiĝas, ili almenaŭ ideologie estas imensa pluso de la kapitalismo kulturigante ĝin. Ili ampleksas grandan parton de la laŭleĝa superkonstruaĵo de la ŝtato, apogante samtempe tiun potencaparaton kulturan kaj politikan kiun ignori estas eraro. Je vasta bazo la privatmastruma ideologio, civilizita per kulturaj influoj, leviĝas, montrante sin kiel potenca faktoro kies influo atingas eĉ grandan parton de la proletaro. "Ĉar ne la konscio de la homoj difinas ilian socistaton, kontraŭe, ilia socistato (kaj tiu dependas je la ekonomia konstruo de la socio) difinas la konscion de la homoj! Ĉi-tio por trafe klarigi mian ŝajne strangan proletstarpunkton pri la klasaj fortoj.

Sed "la homo mem estas la bazo de sia produktado de valoroj kiel tiu de ĉio kio ajn ĝi estu, pri kio li okupas sin."

Atingante per tio la ekscion de la supereco homa kontraŭ la nura mastruma proceso, mi rajte povas preterpasigi nun la faktorojn spirite necesajn post la jam priskribitaj faktoroj materie necesaj.

Mi citas unue Marks: "Certe la armilo de la kritiko ne povas anstataŭi la kritikon de la armilo, nur la potenco materia renversas la potencon materian, sed — ankaŭ la teorio fariĝas potenco materia kiam ĝi enpenetras la amasojn." Ĉi-teorio tiukaze estas la socialismo. Socialismo signifas komunan socion bazitan sur la kolektivproprajo, ĝi signifas solvon de sennombraj novaj organizformoj, sed ankoraŭ pli ol tio — plej altgradan pliigon de la eroj spiritaj kaj etikaj — plej perfektan humanecon — individuigon de la opulo por ĉiuj — finfine la socialismo ne nur signifas forĵeti la katenojn kapitalistajn sed same tiujn de la egoismo, de la senpripenseco, de la senameco — krei kun ĝojo kaj devsento. Ĉu ekzistas io kio estas pli klopodinda? La neforgesebla Jean Jaurès diris: "La socialismo ne plu estas organizaĵo de unu klaso, sed tiu de la tuta nacio liberigita. Mi kiel socialisto neniam apartigas la laboristklasan liberigon de la kulturo humana. La ekestiĝo de la socialismo portos la tutan produktantaron al plej alta kulturo humana. Ĝi pliigos la nunan kultnrstaton de grandega parto popola altigonte ĝin al formo nuntempe apenaŭ revebla." Kiom mi amas ripeti ĉi-tion!

Kaj la socialismo, ĉi-armilo, ĉu aplikata praktike aŭ trastudata spirite, certe gravos ĉe definitiva decido pri Daw. proj. La potencfaktoro kapitalismo tiom reale bazita, bezonas samvalorecan kontraŭulon. Fariĝi tiu, jen la celo de la laboristaro. Ĝi elektas la ĝustan vojon fortigante la organizaĵojn politikajn por per ili utiligi al si la rajtojn de la demokratio politika kaj por influi la administran aparaton kaj leĝigadon — disvastigante la sindikatojn kaj tion ne nur pro problemoj laŭorigine salajrpolitikaj sed por havigi al si la demokration ekonomian kiu ĝis nun al ĝi ankoraŭ mankas, kaj tiamaniere enpenetri la produktadproceson — kaj pligrandigante sian vendadsocietaron por intense instigi la konsumadon kaj ĝin plimalkarigi. En tuto konsiderite, tio nur volas diri ke necesas plua disvolvigo de jam ekzistantaj pozicioj. Ju pli fortaj ili estas, des pli ili estas timindaj kaj des malpli necesas perfortaĵoj kiujn bezonas etgrupoj por daŭrigi sian nuran ekzistrajton. Sed plue, Wilhelm Liebknecht iufoje deklaris: "Scienco estas potenco", kaj la venkita korso Napoléon konfesis sur Sankta Heleno (insulo mediteranea): "Nur ekzistas du potencoj surtere, t. e. la spirito kaj la sabro, sed ĝis nun la spirito ĉiam venkis la sabron". Jen ankoraŭ ilo por venkeme batali samtempe fortigante sin: scienco! Ĉu ni ne havas tiajn fontojn por elĉerpi ilin: Marks, Engels, Lasalle, Bebel, Liebknecht ktp? Nu bone, ni ekestigu de ilia scio similaĵojn interne de ni! Ni disvastigu ilin per postuloj etikaj! Ĉu ni ne sentas sankton jam surtere travivitan trastudante la spiritan kaj etikan altecon de Zaratustra? Ĉu kaj ni kiel proletarioj ne jam posedas etikajn ideojn: solidarecon, justecon kaj humanecon? La fiereco de la kreanto je tio aldonas la klaskonscion kaj antaŭ ĉio la memkonscion. Ĉu aŭ tiu estas klaskonscia kiu eĉ ne riskas postuli esti estimata kiel homo kreanta kaj anstataŭ tio svingas humile sian ĉapon renkontante sian ekspluatanton? Ho, mi bone scias la kialon de mia skeptismo! Resumante ĉi-ĉion, oni vidas kia faktoro la laboristaro povas esti, se ĝi volas. De kiam ĝi fariĝos tiel, ĝi kuraĝe povos frontigi sin kontraŭ la kapitalismo, ĉu tio estu pro Dav. proj., aŭ pro alia por ĝi grava problemo. Kaj ĉiam ĝi havos la agadklarecon kaj respondecsenton kiel akompanuloj, disvolviĝante tiel. Marks ja diris: "La liberigo de la laborista klaso nur povas okazi per la laborista klaso mem." Sed elpensante tion, tiom profundvere, li certe tute ignoris la maŝinpafilojn kaj nur kredis je la sana spirito de ĉiu opulo esperinte ke ĉiu ekkonu sian situacion kaj per tio aliĝu al socialismo por tiamaniere, kune kun la aliuloj, krei tiun grandan potencon kiu necese renversos iutage eĉ la plej materian faktoron, la kapitalismon mem, ĉar: "ankaŭ la teorio fariĝas materia potenco de kiam ĝi influas la amasojn." Kaj ni, kiuj jam klare vidas tiurilate, nia devo estas plirapidigi la konstruon de la proleta potenco, memedukado kaj amasinstruado helpos al ni, la nura perfortaĵo kaj senfina kritiko forestos. Ĉu tio vere signifas ke fariĝu el ĉiu unu Markso, aŭ ne nur signifas krei tiun homon socialistan kiun ege bezonas la estonta epoko por esti vivkapabla?

K-do 1187 demandis min kion mi opinias pri la bazo de realo *Rusio*. Certe la nuna Rusio signifas pluson por la internacia laboristaro, ĝi similas al New Lamark de Owen nur gigantece pliigita, sed ĝi certe subiĝos al influoj privatkapitalistaj ĉar ĝiaj subteraj trezoroj ĝis nun ne vekitaj tro postulas esti utiligitaj. Kelkaj seriozaj kontraŭdiroj pri Rusio ankoraŭ: Ĉu vere necesas koalicioj kune kun ĉinaj generaloj, reakciaj despotoj kaj tio nur pro taktikaj sukcesoj? Ĉu al Rusio vere la strecoj porimperialistaj estas tiom necesaj ke eble baldaŭ inter ĝi kaj la monarka Japanio militista kaj la tiel nomitaj "ekvekiĝintaj popoloj aziaj", t. e. precipe Hindio kaj Ĉinio, formiĝos bloko gigantvasta? Ĉu tiu kreaĵo, kiu laŭ siaj ekonomiaj kondiĉoj plenrajte postulas estontecon, eble reprezentos simbolon de proleta eksterpolitiko? Mi alte estimas ti-kion kreis Lenin kaj atente trastudas lian gigantan heredaĵon, sed konsiderante la estontan ekonomiimperion kapitalistan de Orientazio mi rememorigas al mi elparolon de Engels: "Se la interna ŝtatekzekutivo de iu lando kontraŭstaras al tiu ekonomia disvolviĝo, ĉi-lasta efektivigas sin renversante la potencaparaton politikan" (ekz. la granda franca revolucio). K-do 1187; ni esperu do, ke Orientazio ne fariĝu fatala al Rusio bolŝevika.

*SAT-ano 300.*

[1]) Vidu n-ojn 12, 16, 22.

---

### Lingvaj studoj

(Koncerne artikolon de Maksim Krjukov en n-o 14 de "Sennaciulo").

En la nomita gvida artikolo sub titolo "Lingvaj studoj" ni trovas jenajn punktojn, kiuj postulas ĉu detaligon, ĉu disputon aŭ eĉ refuton:

1. M. Krjukov diras pri modernaj ŝanĝoj kaj simpligoj de la lingvo, ne montrante precize kion li aludas: ĉu partan simpligon de ortografio, ĉu simpligon de la lingvo ĝenerale. Ne priparolinte la amplekson kaj limojn de eventualaj simpligoj, li povas inciti plurajn neseriozajn reformemulojn fari tute hazardajn kaj necelkonformajn projektproponojn tiudirekte.

2. La artikolo de d-ro Dietterle, pri kiu parolas M. Krjukov, laŭ nia opinio estas tre grava, altvalora kaj skribita sen ia tendenca vidpunkto. Ni dezirus, ke similaj esplor-lingvaj artikoloj aperu pli ofte sur la paĝoj de "S-ulo". Identigo de opinio de Dietterle kun tiu de neprogresemulo aŭ eĉ burĝo ŝajnas al ni nekomprenebla kaj mallasebla, ĉar ĝi transiras la limon, post kiu komenciĝas demagogio.

3. Priskribo de situacio de instruituloj en Sovetio, farita de M. Krjukov, estas malĝusta, ĉar efektive la scienculoj kaj specialistoj havas decan atenton de Soveta Registaro, kiu faras ĉion eblan por faciligi kaj akceli ilian sciencan laboradon.

Tiuj ĉi rimarkoj donas al ni rajton konkludi, ke M. Krjukov rilatas al la fako "Lingvaj studoj" ne tiom plenserioze kaj pripense, kiom devigas tiu ĉi grava fako.

La Redakcio de "*Esperanto Hejme*" — gazeto-lernolibro por laboristoj.

Kazanj (Rusio), januaro 1925.

Ankoraŭfoje:

## Ĉu dikredanto povas esti SAT-ano?

Mian opinion al la supra demando mi esprimas tute mallonge: Ne!

Kio estas kristanismo kaj kio estas socialismo?

Kristanismo edukas la homon koni la rilatojn inter dio kaj la homo. Socialismo edukas koni la rilatojn inter la homoj. Kristanismo dependigas la homon en ĉio de dio. Socialismo instruas pri egaleco, libereco kaj frateco. La kristana dio punas per infero kaj rekompencas per ĉiela regno. Ĉiu socialisto dependas de la publika opinio de la socialistoj. Ĉe la socialistoj ĉio estas permesata al alia socialisto, per kio li ne domaĝas la rajtojn de la alia. Moro kaj religio estas la samo ĉe la kristanoj. Tiu ĉi hipotezo estas ilia plej forta armilo kontraŭ ni socialistoj. Tial kiu ne estas religia, devas esti nepre senmorala. Ne ekzistas alia rimedo ol kontraŭ kristana moralo starigi socialistan moralon, kaj tuj ni ekvidos la superecon de la socialismo al kristanismo. Kaj krome, — la kristanoj ne povas solvi inter si la konfliktojn ol per intermilitado. Sed en socialista socio ne estas ebla la milito.

Kion predikis Jezuo? Humilecon, toleremon, paciencon, rezignacion, por ĉiu malbono sur la tero rekompencon en la ĉiela regno. La homo estas malforta, kontraŭ dia volo nenio estas farebla. De dio nia estonto estas determinita. La teologoj fanfaronas, ke Jezuo egaligis per siaj hipotezoj la malriĉulojn kun la riĉuloj, kaj per la Mariakulto egaligis la inojn kun la viroj. Fine Jezuo resp. propagandistoj de lia doktrino por sekvi lin faris leĝon kun X paragrafoj.

Kaj nun venas Marks. Li ne komencis per leĝoj sed donis konsilon por krei la eblecon vivi home. Li diris: Por ke unu homo ne povu subigi, humiligi, eluzi la alian homon, devas esti forigita la proprajo, kaj la tempo, loko, kultura alteco montros, ke kie kiaj ŝanĝoj devas sekvi la komencon. Li diris: Nia sorto dependas de ni mem kaj de la cirkonstancoj (materiaj), en kiuj ni troviĝas. Nia ĉies deziro povas esti realigita, ĉio dependas nur de nia volo. La granda mizero regadas inter ni, ĉar ni ne ricevas la tutan rekompencon por nia honesta laboro, ĉar ekzistas privilegioj, monopoloj. Ke ĉiuj laborantoj, kiujn trafas tiu ĉi sorto, apartenas en la saman klason. Ke kiuj estas konsciaj tiun ĉi sian situacion, havas klaskonscion. La klase konsciaj atingas sian celon (socia ordo de la laborantoj) per la klasbatalo. La proletaro ne povas esti liberigita se ne per siaj propraj fortoj. Ke tio povu sukcesi "Proletarioj de ĉiuj landoj unuiĝu!"

Nun, kamaradoj, post la komparo de socialismo kun la kristanismo juĝu, ĉu povas esti SAT-ano dikredanto, "ĉu efektive la dikredado estas tiom danĝera al la socialismo?" ĉu "La tezoj de Jezuo neniel kontraŭstaras socialismon"? *SAT-ano 1934.*

HELPU
PLIMALKARIGI LA GAZETON!

VARBU
POR LA
REKLAMFAKO!

## S.A.T. (So-ve-ti) ano

SAT ne minacas kaj ne bruas, sed paŝ' post paŝo ĝi detruas fortikajn murojn de miljar'.
laŭ Devjatnin.

Kiam mi parolas pri SAT, mi substrekas, ke SAT gravas ne danke al sia hodiaŭo, sed danke al sia morgaŭo (estonto).

SAT estas la ĝermo de estonta (finkonstruita) socio.

Per tio ĉi SAT diferencas de aliaj nuntempaj unuiĝoj (kooperativoj teritoriaj kaj profesiaj, partioj, nacioj ktp.), al kiuj SAT rilatas same kiel al apartaj individuoj amike kaj akcelas iliajn naturajn aspirojn al senfina disvolviĝo, kondiĉe: ili ne malhelpu al la bono de la tuto.

Fina idealo de SAT estas *tutmonda individuaro*, asocio en kiu la libera disvolviĝo de ĉiuj estos asekurita per libera disvolviĝo de ĉiu (laŭ Komun. Manifesto).

Tiu-ĉi "tutmonda individuaro" devos esti *science organizita.* (Ĝi ne havu ian ajn arbitran aŭtoritaton, krom la realeco kaj la bono de la tuto).

La "tutmonda individuaro" konsistos, kompreneble el *viveroj etikaj* laŭ ilia kosma mondkoncepto kaj konduto.

Laŭ la direkto de scienca organizo (kultura, kooperativa, profesia, partia ktp.) kaj vivereco etika (kontraŭbatalado al iu ajn mistika Dio kaj anstataŭigo de ĉiuj nebulaj revoj per reala etiko) la SAT-anaro (ĝermoj de tutmonda individuaro) plej intensive marŝu!

Ludo de vortoj kreas karan por ĉiu subpremito esprimon:

*SO VE TI*

kaj en Sovetio (soveta unuiĝo) SAT trovos plej bonan kampon por sia laboro (agado).

Necesas substreki, ke pro la *sukceso de stabiligita monsistemo* en USSR (donanta al la laboruloj pli kaj pli da libereco, konsiderante la realan staton de la socio, sendepende unu de la alia disponi pri si, sia laboro kaj ĝiaj fruktoj, krom la parto por asekuro de sociprogreseblo) + *kooperacio* + *kultura laboro* = en sumo la pliviglîĝo de sovetio, ĝi (la Soveta Unuiĝo) povas esti la plej bona apogpunkto al ĉiuj batalantoj por plej feliĉa vivo sur la tero.

*Aparte* por la tiel nomataj *pacaj batalantoj*, ĉar en Sovetio la militperiodo finiĝis kaj komenciĝas periodo (ni esperu, ke ĝi estos senfina) de la plej intensiva paca laboro por la bono de la tuta homaro. *J. Brukson, 1896.*

# DIVERSAĴOJ

### La kapitalista profitsistemo

La elekto de Prezidanto Coolidge estas komenco de freneza spekulaciado ĉe la Nov-Jorka akciborso. Akcioj ĉiuspecaj atingas neantaŭviditajn altprezojn. Meznombro de 2 milionoj da akcioj vendiĝas ĉiutage. Kiel ekzemplo la akcioj de la CSCK.o[1]) staris je 50 punktoj last-somere. Hodiaŭ ĝi atingas 170 p. Tenintoj de tiuj akcioj pliriĉiĝis po 12000 dolaroj por ĉiuj 100 akcioj. Alia, — akcio de la CIPFK.o[2]) staris 1924 je 60 p. Febr. 11. ĝi staris je 250 p. Unu semajnon antaŭe ĝi staris je 195 p.

S-ro W. C. Durant, bone konata spekulaciulo, per la akcioj de unu kompanio gajnis al si 2250000 dolarojn en daŭro de kelkaj tagoj. Laŭ raporto li gajnis entute pli ol 10000000 dolarojn. *1242*

1) Commercial Solvents Chemical Man. Co.
2) Cast Iron Pipe Foundry Co.

### Kontraŭ komunigo

En la ordo de la kapitalismo vidiĝas multaj trouzoj de laborfortoj (produktiloj).

Unu el la plej trafaj ekzemploj estas, en plej progresintaj landoj, la privata aŭtomobilo. Mi ne parolas kontraŭ la vartransportilo; kiel tia, la aŭtomobilo estas tre konvena kaj progresiga. Kiel ambulancoj, fajrestingiloj ktp. ĝia uzado estas bonega.

La plej bonaj formoj de homportaj servadoj devus esti la komunaj.

Kompreneble, la *privata* aŭtomobilo estas "lasta vorto" en ĉiampreta servado privata. Sed la kapitalismo tute ne edukas la popolojn pri trouzo. Eĉ la laboristoj mem plejmulte ne atentas tion. Ili pensas ke la valoro kaj eluzo, fakte la celo de iliaj kreitaĵoj, estas afero nur por la dungisto kaj la aĉetonto. Se oni dungus lin por enŝuti akvon per sitelo en riveron, li kontentus — nur la salajro ricevota gravas. Nur post multjara proletara regado la homaro rigardos kiel vera krimulo misuzanton de laborfortoj de aliuloj.

La trouzo kaj tromultiĝo de aŭtomobiloj evidentiĝas en tiu ĉi lando[1]). Ili ruliĝas tien kaj reen, kaj oni povas verdiri ke multfoje oni uzas aŭtomobilon ne ĉar *necesas* veturi sed male ke oni veturas ĉar oni posedas.

Ne malofte riĉulo havas aron de „aŭtoj", kaj eĉ "propran" por ĉiu ano de la familio. Ni aŭdas pri riĉulinoj kiuj posedas "aŭtojn" de malsamaj koloroj por harmoniigi ilin kun la vestoj portataj.

La "aŭtoj" dense viciĝas, dum la riĉulinoj vagadas tra la magazenoj.

Dume, la geblinduloj, devigataj laboradi por panakiri, piedpalpas la vojojn plenriske. Ne nur riĉuloj, sed ankaŭ mezklasanoj kaj eĉ laboristoj kulpas pro tiu trouzo — ĉi tiuj ĉefe per la pli malkara aŭtobiciklo.

La ŝtalo, karbo, scienco, organizado kaj laborfortoj uzitaj en la produktado de tiaj maŝinoj, ankaŭ la grandskala konsumado de petrolo kaj oleo devus esti pli bone uzataj por la homservado. Mi estas certa ke post plua progreso Sovetlando rimarkindos pro manko de tiaj veturiloj. *1242.*

1) Britio.

# TRA LA KLASBATALO

En Halle (Germanio) la polico pafis en dense plenigitan salonon dum komunista porbalota kunvenego, post kiam estis parolintaj angla kaj franca kamaradoj, kies paroladoj tiom ekscitis la naciecan burĝaron, ke ĝi sendis siajn ekzekutistojn. Estis mortigitaj 10 laboristoj, inter ili 2 virinoj, 54 vunditaj.

La parlamentaj seĝoj de l' Radiĉpartio en Jugoslavio estas deklaritaj nulaj de la blanka registaro.

En Italio okazas metallaborista striko, kiu jam daŭras kelkan tempon kaj akceptis grandan amplekson.

La striko de la germanaj fervojistoj pliampleksiĝis. Intertraktoj malsukcesis.

Baldaŭ komenciĝos en Tallinn la proceso kontraŭ la partoprenintoj je 1. dec.-ribelo.

La lokaŭto de 130000 laboristoj en Svedio flanke de la svedaj industriistoj pro labortempo kaj salajro efektiviĝis.

# RUĜA HELPO

**Al la laboristoj kaj kamparanoj en ĉiuj landoj!**

Kamaradoj! Fratoj! 18. marto ni solenas la 54. datrevenon de l' glorplena Pariza Komuno — de l'unua provo de la proletaro, transpreni en proprajn manojn la potencon. Nur 72 tagojn ekzistis la Pariza Komuno. Kaj la lasta semajno de la Komuno, la sanga maja semajno, de l' jaro 1871 estu kaj estos neniam forgesita de tiuj, kiuj nuntempe devas suferi sub la premo de l' ekspluatado, sub la premo de l' imperialismo. En tiu sanga maja semajno 30000 Parizaj gelaboristoj estis forbuĉataj kaj ĉiuj ti-kiuj kune kun ili agadis kontraŭ la ekzekutistoj de Versalo, 45000 komunanoj poste estis ĵetataj en la malliberejojn kaj pundomojn. La fervoro de l' triumfanta burĝaro progresis ĝis tia grado, ke pro la arestoj tutaj industribranĉoj de Parizo devis ĉesigi la laboron.

La tago de l' 18. marto, la tago de l' Pariza Komuno, fariĝis nun la tago de l' Internacia Ruĝa Helpo. En tiu ĉi tago ni rememoras la glorajn farojn de l' Parizaj komunanoj. La de ili levita standardo — la Ruĝa Standardo de l' laboruloj, troviĝas en la garantiantaj manoj de l' laboristoj kaj kamparanoj de la Sovet-Unio. Pro tiu ĉi standardo, pro la heredaĵo de l' Komuno, akrega batalo okazas en ĉiuj kapitalistaj landoj. Kun sanga krueleco la burĝaro subpremas ĉian provon de protesto kontraŭ la ekspluatado kaj subpremo, malliberejoj kaj ekzekutoj estas la rimedoj de la burĝaro.

Sole en Germanio suferas en la karceroj pli ol 7000 revoluciuloj, en Polio 5000, en Italio 5500, en Estonio 1200, en la Balkanlandoj 4000, en Finnlando 1350, en Hispanio 700, en Hungario 300, en Rumanio 800. La samo en la koloniaj kaj duonkoloniaj landoj — Hindio, Sudanteritorio, Koreo ktp., kie ne malmultaj junaj revoluciuloj devas suferi malliberecon kaj turmentojn. Ankoraŭ la sanga teroro en Estonio ne ĉesis kaj jam en Jugoslavio similaj okazoj estiĝas.

Ĉu oni do povas forgesi kiom da infanoj, kiom da proletfamilioj post la bataloj de l' jaroj 1919 kaj 1921 en Germanio, post la falo de l' hungara, bavara, finna sovetrespublikoj restis sen perlaborantoj?

Kamaradoj! Fratoj! Postulu je la tago de l' 18. marto la malfermon de l' malliberejaj pordoj, postulu la liberigon de l' revolucibatalantoj. Postulu ke viaj patroj, fratoj, fratinoj, edzoj kaj infanoj estu liberigataj.

Amnestio estu la lozungo de ĉiuj laboruloj je l' 18. marto. Sciu, ke vi akiros veran amnestion, veran liberigon nur tiam, kiam la muroj de l' bastilo de ĉiuj ekspluatatoj kaj subprematoj estos disŝiritaj kaj la kapitalo estos ruinigita. Sed hodiaŭ ĉiu el ni devas pretiĝi por la protekto de nia avangardo — hodiaŭ ĉiu devas aliĝi al IRH. La IRH — la Ruĝa Helpo de l'revolucia proletaro, helpos materie kaj morale al la viktimoj de l' blanka teroro kaj de la burĝa juĝado. Ĉiuj, al kiuj estas karaj kaj helpindaj la partoprenintoj je batalo pro la liberiĝo de l' laborularo arestitaj de la burĝaro, devas subteni hodiaŭ la IRH.

Je la tago de l' 18. marto protestu kontraŭ la subpremo per la burĝaj registaroj kaj faŝistaj bandoj! Sekurigu kontraŭ ili vian Ruĝan Helpon! Klarigu kaj senvualigu la brutecajn agojn de l' kontraŭrevolucio.

Klarigu kaj disvastigu la grandan ideon de l' IRH, de l' Ruĝa Postfronto de l' proletara revolucio!

Dediĉu vian memoron al la ParizaKomuno!

Donu tion kio konvenas al tiuj, kiuj daŭrigante la proletaran aferon fariĝas martiroj de l' Mondkomuno!

Vivu la Ruĝa Helpo!

Vivu la internacia solidareco de l' laborularo!

*La Ekzekutiva Komitato de l' Internacia Ruĝa Helpo.*

# RECENZEJO

## Gazetoj

**Nova gazeto.** *Liberpensulo,* n-o 1, jan.-febr. 6 pĝ. Sekretariejo: Kurt Hubricht, Mariannenstr. 22, I, *Leipzig-Neustadt* (Germ.).

Jen nova faka gazeto de niaj liberpensaj amikoj. Kiel oficiala gazeto de Internacia Ligo de liberpensuloj oni ne povas kontesti ĝian ekzistrajton. Tamen tion, kion prezentas la enhavo, la liberpensaj legantoj de l' nova gazeto povus trovi ankaŭ en "Sennaciulo", kiu neniam malkonfesis sian favoron al liberpensula movado kaj ankaŭ malavare malfermis siajn kolonojn por liberpensecaj temoj. Aŭ ĉu "Senn." pritraktas tro proletmaniere la ateismon? Cetere, la intenco de l' nova gazeto ja estas modesta: dumonata apero. Espereble ĝi havos bonan propagandan efikon en liberpensulaj rondoj. *Red.*

## Libroj

**El la mondbildo de la nova fiziko de** *D-ro Reiche.* Tradukis H. Muravkin. Eldonis Eldona Kooperativo de SAT. Mendebla ĉe la Administrejo de SAT, Colmstraße 1, Leipzig-Stötteritz (Germanio). Formato 17×12 cm., 52 pĝ., broŝurita. Prezo 0,40 mk. (0,80 sv. fr. por bonval.).

Tiu eldonaĵo estas la unua de serio dediĉita al moderna scienco. Ĝi pritraktas en konciza, tamen facile komprenebla alloga formo tiujn problemojn de moderna fiziko, kiuj hodiaŭ tuŝas eĉ ĉiun simplulon, ĉiun nefakulon — pro la mirigaj rezultoj en la fako de radiotekniko — la radioenergion kaj la elektran strukturon de l' materio. Kvankam destinita al sciencemuloj, pro ĝia klara traduko oni povas certigi, ke ĝi ankaŭ tre utilos al la legantoj-sciemuloj. Ni esprimu deziron, ke dank' al tiel sindonemaj kaj lertaj tradukistoj pli riĉiĝu la sciencteknika biblioteko de SAT. *Frida.*

**La regado de si mem per konscia aŭtosugesto** de *E. Coné.* Esperantigis J. Borel. Eldon. Esp. Verlag Ellersiek kaj Borel. N-o 33 de Esp.-Biblioteko Internacia. Formato 14×10 cm., 56 pĝ. Prezo 0,30 Goldmark.

Jam multnombraj aŭtoroj publikigis traktatojn pri aŭtosugesto, ĉu konscia, ĉu senkonscia! Prof. Coné, el la fama skolo de Nancy, deiras de la principo, ke la subkonscio estas la granda aganto en ĉiu homo, kaj ke tiu forto laboras, tute sendepende de nia volo, sub influo de la imago. Oni, do, nur faru al si imagon de la dezirita korpa plibonigo, aŭ mensa progreso, kaj lasu labori la subkonscion tute libere. Iom post iom oni konstatas plibonigon. Tial ke Prof. Coné plej sindoneme kaj senpage kuracas ĉiujn suferantojn, nur pro amo al la suferanta homaro, oni komprenas la kvazaŭ religian entuziasmon de lia adeptaro, nomante lin la "moderna miraklisto". Kelkaj preseraroj ŝoviĝis en la tekston. Aliparte oni ne bone komprenas la uzadon de la vorto "abandoni"? *Frida.*

**Aventuroj de Malspertulo de** *Robert Reitzel.* Esperantigis D.ro Tobias Sigel. Eldonis Esperanto Verlag Ellersiek k. Borel. Berlin kaj Dresden. Formato 18×13 cm., 32 pĝ., kartonita. Prezo 1.20 Goldmark.

Tiu broŝuro, ornamita de bela portreto de Reitzel, enhavas nur fragmenton de la verko de la mortinta fama aŭtoro, kaj la interesplena rakonto kaj belstila tradukaĵo naskos en la animo de la "komprenemaj legantoj" peziron, legi la tutan verkon. *Frida.*

# V. Kongreso de SAT. Wien, Aŭgusto 1925

## 2. Komuniko

**Kongresadreso:** *Josef Slezak, Wien XX.* Ospelgasse 34/25.

**Kongreskotizo:** La simpla membrokotizo de SAT por la diversaj landoj. Senlaboruloj, post atestita senlaboreco, pagas la duonon.

**Pago:** per naciaj monbiletoj en registritaj leteroj.

**Aliĝo:** Valoraj estas nur aliĝiloj akompanataj de la kotizo. La aliĝilon tekstu legeble laŭ jena ordo: 1) familia nomo, 2) antaŭnomo, 3) aĝo, 4) profesio, 5) strato kaj n-o, 6) urbo, 7) provinco, 8) lando, 9) SAT-membromatrikulo.

**Loĝigo:** Por prizorgi la konvenajn loĝejojn estas necese, ke la gek-doj mendu plej eble frue la bezonotajn ĉambrojn, ĉu privatan, ĉu hotelan ktp.

Kongrestagoj kaj kongresejo estas pli poste publikigotaj.

Gekamaradoj! Ne prokrastu la sendon de via aliĝilo. Se vi mem ne povas veni, tamen subtenu nin per via kotizo.

*1. listo de aliĝintoj*

AŬSTRIO

1 K-dino Berger, Ernestino, Wien II (1792).
2 K-do Straßer, Johann, Wien IV (4113).
3 „ Ĉech, Raimund, Wien IX (1703).
4 „ Klatil, Adalbert, Wien XV.
5 „ Slezak, Josef, Wien XX (1102).
6 „ Wyborny, Ferdin., Wien XX (1352)
7 „ Aicher, Anton, Wien X (933).
8 „ Hejda Vojtech, Wien XII (1795).
9 „ Feith, Siegfried, Wien VI (962).
10 K-dino Friedrich, Erne, Wien XVI.
11 K-do Rasztoczky, Daniel, Wien XXI (3278)
12 „ Jonas, Franz, Wien XXI (1484).
13 „ Sonnenfeld, Ernst, Wien VI (968).
14 „ Polzer, Franz, Wien XVI (1252).
15 „ Winkler, Johann, Wien XIV (4369).

GERMANIO

16 „ Ort, Georgo, Cassel (279).
17 „ Wolfschmitt, Hans, Munĥeno (1804).
18 „ Wengenroth, Karl, Solingen (3989).
19 „ Schmitz, Walter, Solingen-Mengenberg (3988).

FRANCIO
20 „ Piron, La Garenne-Colombes (114).
21 „ Glodeau, Paris XX (50).
22 „ Lanty, Paris XI (1).
23 „ Banmer, Paris XX (11).
24 K-dino Frida Noel, Paris XX (1370).

*La Komitato de la Va.*

## Kelkaj opinioj pri Esperanto

Al legantoj de "Sennaciulo" jam estas konata opinio de k-do Lunaĉarskij pri Esperanto. Nun ni pleżure presas ankoraŭ kelkajn opiniojn de konataj Sovetiaj Kamaradoj.

K-do *Krasin,* Popola Komisaro por Ekstera Komerco kaj Ambasadoro de SSSR en Francio sendis jenan mallongan letereton al redakcio de "Soveta Esperantisto" (monata ruslingva organo de SEU):

*"Mi salutas kamaradojn esperantistojn. La lingvo internacia estas unu el la kondiĉoj por efektivigi la fratecon de popoloj.*

*27. febr. 1925. Krasin.*

Konata sovetia ĵurnalisto kaj publicisto k-do L. Sosnovskij prezentis por la sama gazeto jenan artikoleton:

*"Se flankenlasi la disputojn pri la eblo anstataŭi la malnovajn, historie kunmetiĝintajn lingvojn de la popoloj per la nova artefarita lingvo, — do la serva rolo de la lingvo Esperanto aŭ de alia, pli perfekta, — estas sendiskuta. Se ne hodiaŭ, do morgaŭ ekfluos per granda torento la amasaj ekskursoj de laboristoj el SSSR eksterlanden kaj inverse. Esperi, ke rusa laboristo, veturanta en Eŭropon, ellernos antaŭe 5 — 6 lingvojn por viziti 5 — 6 landojn, — estas naive. Li ne povos, certe, ankaŭ per Esperanto sin turni al la laboristaj amasoj de Okcidento, ĉar ankaŭ tie tiu ĉi lingvo ne estas sufiĉe disvastigita. Sed se en ĉiu lando la komunistaj partioj almenaŭ iomete sin okupus pri tiu ĉi problemo, kiomoble plifaciliĝus la eblo por nia vica laboristo, ne posedanta la fremdajn lingvojn, komunikiĝi kun la fratoj laŭ la laboro kaj laŭ la batalo en aliaj landoj.*

*PRECIPE GRAVE ESTAS ENTIRI EN LA MOVADON DE ESPERANTO ALMENAŬ IOMAN PARTON DE JUNULARO NIA.*

*Kun saluto L. Sosnovskij."*

Niaj sovetiaj kamaradoj evidente ne sufiĉe ankoraŭ laboris por montri la nunan disvastiĝon de Esperanto en laboristaj medioj de Eŭropo kaj por vaste konigi la nunan praktikan uzeblecon de Esperanto por laborista klaso. Ni esperu ke la nuna granda vigliĝo de Esperanto-movado en Sovetio helpos al niaj sovetiaj k-doj forigi proksimtempe tiun mankon.

Fine estas tre interese konigi al niaj legantoj ankoraŭ la opinion de konata moderna rusa verkisto Elio Erenburg. La legantoj de la antaŭa Literatur-Scienca Aldono kaj de la nuna Sennacieca Revuo jam povis konatiĝi kun kelkaj majstraj paĝoj de tiu aŭtoro: fragmento el "Julio Jurenito" (prononcu: Ĥulio Ĥurenito), la rakontoj "La pipo de paco" kaj "La pipo de komunano" bone montras la talenton de Erenburg kaj lian kapablon akre vipi la klason kapitalistan kaj ĝiajn morojn per siaj verkoj.

En sia libro "Kaj tamen ĝi moviĝas", traktanta pri la nova stilo en literaturo, arto kaj vivo jenajn liniojn dediĉis E. Erenburg al la problemo pri la lingvo internacia:

"Dume la literaturo estas malbonfeliĉa en sia nacia limigiteco (lokaleco de la materialo mem), sed la simptomoj en apartaj landoj estas tiaj, ke mankas duboj — baldaŭ kreado de TUTMONDA LINGVO fariĝos tasko ne de apartaj stranguloj, sed de la homaro.

Mi ne timas esti la unua rusa poeto, montranta rilate al Esperanto ne la ŝercan malŝaton sed la estimon kaj esperon. Dum la lastaj jaroj Esperanto havis vicon da konkiroj. Instruado de tiu ĉi lingvo, kiel deviga objekto, estas enkondukita en lernejoj de Svisio, en kelkaj regionoj de Belgio k. al. Pli grave — internaciaj laboristaj organizaĵoj komencas kompreni la maturiĝintan neceson. Estas eble, ke Esperanto ne konserviĝos, estos anstataŭita per io pli perfekta. Por mi klaras jeno: la homaro proksimiĝas al tiu aĝo, kiam anstataŭ balbutado de praavoj ĝi kreos por si novan, unuecan lingvon" *(E. Erenburg. Kaj tamen ĝi moviĝas, pĝ. 102).*

*Komunikis 1516.*

## Al ĉiuj Naturamikoj!

*Anoj de la turista asocio "La Naturamikoj"!*

La 24. ĝis 28. julio 1925 okazos en Frankfurt a. M. (Germanio) la internacia laborista sport-olimpiado. Ankaŭ la naturamikoj tie partoprenos per ekspozicio kaj aliaj aranĝoj, por propagandi la naturamik-movadon. La 26. okt. 1924 sur la Königstein okazis kunveno de la saksaj naturamik--esperantistoj. Tiu konferenco kaj multaj aliaj k.doj proponis, ke dum la Olimpiado ni aranĝu kongreson de niaj sekcioj. Konsekvence el tio mi kunvokas per tio la ĉi-jaran *kongreson de la naturamikaj Esp.-sekcioj* al *Frankfurt a. M.* dum la Olimpiado.

Kamaradoj! Esperanton parolantaj Naturamikoj! Venu multnombre al Frankfurt. Nia centralo en Wien ankaŭ sendos reprezentanton. Zorgu, ke ni povu imponi per granda nombro de ĉeestantoj; zorgu, ke tiu kongreso fariĝu grava kaj impona okazo en la naturamika Esperanto-movado.

Centralo de la naturamikaj Esperantosekcioj
en komisio: *Peter Klopfleisch,*
Friedrich Engelsstr. 11, *Düsseldorf-Eller,*
Siedlung "Freiheit" (Germanio).

# KRONIKO

**Bulgario.**

Ni jam fondis instruistan esp. grupon en la nova regiono de Bulg., kiu celas disvastigi esp-on inter bulgara instruistaro. Ekzistas du instruistaj organizaĵoj, unu laŭleĝa, kaj la dua estas danĝera, ĉar ĝi vokas la bulg. instruistaron kaj proletaron pri unueca fronto kontraŭ la burĝaro. Ni agas tute kaŝe, ĉar la bulg. ministroprezidanto de la popola klerigado sendas al ni "karessalutojn", kaj ni perdus niajn oficojn. — *Por la grupo de SAT-ano 1433, 4100, 4099.*

**Germanio.**

Je pasko en Dresdeno okazos 15. kongreso de *Libera Laborista Unio* (F. A. U. D.), sindikalista, aniĝinta al I. L. A. Kiel propono 18 al ĝi la *Laborborso Neunkirchen* (Saar) proponas: "rekoni esperanton kiel solan

# Skizoj pri nacia kaj kolonia problemo

5] *G. Brojdo*

Kolonia politiko de tiuj teoriuloj estas prezentata kiel "natura neceso pro tio ke la naturo mem kreas regantajn kaj sklavajn naciojn".

"Germanoj — skribas unu el tiuj teoriuloj, *Boriĥan,* — estas envere ŝtateca nacio, kree dotita", — jen la teorio, sur kiu estis konstruataj la imperialismaj atencoj de germanaj kapitalistoj, elmetintaj la devizon: "germanio super ĉio".

Same eraras en la nacia problemo ankaŭ la literaturo, sin nomanta "socialista".

Unu el plej bonaj spertuloj en la nacia problemo, Otto Bauer, donas jenan difinon de la nacio: "Nacio, tio estas la tuta aro da homoj, kunigitaj per komuneco de karaktero surbaze de komuneco de la sorto".

Unue, tiu ĉi difino taŭgas ne nur por tribo, gento kaj nacio, sed eĉ por tia komuneco, kiel grupo da enkarcerigitoj, dum kelkaj jaroj kune loĝantaj en unu karcero.

Tiusence ĉi difino nenion difinas. Sed la ĉefa momento en tiu ĉi difino — estas kaŝo de tiu fakto, ke nacio estas — historia fenomeno, ke ĝi sensîre estas ligita kun apero kaj neniigo de kapitalismo, ke ĝi prezentas per si la komunecon de ekonomiaj interligoj, de teritorio kaj lingvo.

Alia spertulo en la nacia problemo, Springer, skribas: "Nacio, tio estas — unuiĝo de egale pensantaj kaj egale parolantaj homoj". Kaj tie ĉi ankaŭ estas la samaj mankoj, kiel ankaŭ en la antaŭa difino. La nacio, laŭ Springer, ekzistas ankaŭ tie, kie estas nek ekonomia interligo, nek komuneco de teritorio.

La nacia komuneco estas utiligata de burĝaro kiel ilo por nebuligo de klasaj interesoj, en la samaj celoj la burĝa scienco nebuligas la ĝustan komprenon pri tiu pasanta historia formo de interligo en la homa socio, kiu estas nomata — la nacio. *Elrusigis P. Jakovlev.*

### 7. Kiaj ĉefaj periodoj ekzistas en la historio de la nacia problemo?

La nacio ekzistas kiel socia organizaĵo de kapitalisma socio. En tiuj ĉi soci-politikaj kondiĉoj batalas la du bazaj klasoj: proletaro kaj burĝaro. Ĉe la proletaro kaj ĉe la burĝaro kunmetiĝas en la batal-procedo sia klasa rilato al la nacia problemo. La burĝaro utiligas la fakton de naci-ekzisto por disigo de proletoj diverslandaj kaj por ilia instigo unu kontraŭ la alian, unuvorte ĝi gvidas naciisman politikon.

Proletaro luktas por unuigo de proletoj ĉiulandaj, t. e. ĝi gvidas la politikon internaciisman.

Ambaŭ interbatalantaj klasoj havas sian propran politikon en la nacia problemo.

Tiu ĉi politiko ŝanĝiĝas konforme al disvolviĝo de nacio, kaj sekve ankaŭ de la nacia problemo.

Tiu ĉi politiko ŝanĝiĝas en la procedo de ŝanĝiĝo de historiaj kondiĉoj en la granda klasa milito de la proletaro kontraŭ la burĝaro.

Tri ĉefajn periodojn oni povas skizi en la historio de la nacia problemo:

1. La periodo de formiĝo kaj disvolviĝo de kapitalisma socio kaj nacio.

2. La periodo de imperialismo, disfalo de kapitalisma socio, kiam nacio venas en la kontraŭdiron kun interesoj de la naskiĝanta monda mastrumo.

3. Periodo de la proletara diktatoreco kaj sovet-regado, kiel realig-formo de ĉi diktatoreco.

En ĉiu el ĉi periodoj ni havas diversan signifon de la nacia problemo kaj diversan rilaton inter la batalantaj ĉefaj fortoj de kapitalisma socio, kaj tial la nacian problemon, ĝian starigon kaj solvon (politikon) flanke de proletaro kaj burĝaro necesas analizi en ĉiu periodo aparte. *Esperantigis G. D.*

rimedon por internaciaj interrilatoj, praktiki ĝin kaj propagandi ĝin en anarkosindikal. gazetaro". Je 19 la *Sindik. laborista federacio Dresdena* proponas al ĉiuj (samcelanaj) org-aĵoj la lernadon de esp-o, por ke ĝi post supoze 3 jaroj fariĝu sola lingvo por internaciaj interrilatoj.

**Svedio.**

*Eksjö.* Kurso ĉe laboristoj de fervoja laborejo. 6 k-doj restis studantaj.

**Sovet-Unio**

*Baku.* Fondiĝis Esperanto-grupo el 25 k-doj ĉe administrejo de "Azneftj".

*Blagoveŝĉensk s/A.* Funkcias kurso de Esp-o ĉe la I-a sepjara lernejo. Lernantoj de Eksperimente-modela lernejo ĉe Pedagogia Teknikumo starigis per Esperanto korespondadon kun Nova Zelando. Artikoloj pri Esp-o kaj tradukoj el "Sennaciulo" aperas en murgazeto de junul-komunistoj kaj en buŝa gazeto de Gubernia Intersindikata Komitato.

*Caricin.* Ĉi tie estas organizitaj du grupoj, studantaj la lingvon: unu ĉe klubo de poŝtoficistoj, dua (en antaŭurbo) ĉe klubo de fabriko "Barikadoj". La unua havas pli ol 40 p., gvidas k-do Petrov; dua — 20 p., gvidas k-do Veliĉko. Lab-istoj, profesianoj kaj speciale geinstruistoj eniris ambaŭ grupojn. La gvidantoj sin turnas al esp. geinstruistoj kaj lab-istoj organizi interkorespondadon kun grupoj, sendante leterojn laŭ adreso: *A. P. Veliĉko,* Tramvojnaja 3, Sovposjolok, *Caricin,*

*Ekaterinoslav.* Ĉe la laborist-fakultato de l' Medicina Instituto estis aranĝita raporto de k-do Sorokin pri Esp-o antaŭ 35 ĉeest. studentoj, kiu estis aŭdita grandatente.

*Kremenĉug.* Ĉe la Centra Partia Klubo "Bolŝevik" malfermiĝis 2a studrondeto por komencantoj (partopr. 18 k-doj).

— 10. febr. 1925 en la 3a laborlernejo k-do Izgur prelegis pri "Internacia Lingvo Esperanto". Ĉeestis 120 lernantoj de l' superaj grupoj. La prelego elvokis grandan entuziasmon inter la lernantoj; esp-leciono estos enprogramita.

— Aliĝis al SAT loka "Industri-Komerc-Lernejo".

— 11. febr. prelego de k-do Izgur pri "Esp-o je la servo de l' Proletaro" en la Nutraĵ-laborista Klubo por ĉ. 300 ĉeestint. laboristoj. La prelego sekvigis grandan simpation al nia afero meze de l' aŭskultintaro. Studrondeto fondota.

— Societo "Laborista Solidareco" eldonis por — SAT — varbajn propagandfoliojn ruslingvajn (2000 ekz.).

*Moskvo.* 15. febr. 1925 dum la jara festeno de 9a kaj 57a pionir-taĉmentoj en la klubo de Dogadov (ĉe Tutsovetia Intersindikata Komitato — VCSPS.) juna kamaradino Tamara raportis pri esp-o; ŝi montris, kiel la pioniroj de ŝia taĉmento interligiĝis per esp-o kun alilandaj pioniroj; lokiginte korespondan anoncon en "Sennaciulo" pioniroj interligiĝis tuj kun Svedio, Germanio kaj aliaj landoj; la proksima zorgo de revoluciaj esp-istaj pioniroj, konkludis k-dino Tamara — estas per "Sennaciulo" interŝanĝi la informojn pri la pionira movado diverslanda.

Dum la Tutsovetia Kongreso de Klerig-laborula Sindikato estis aranĝita de niaj Moskvaj k-doj ekspozicio de Esp-literaturo kaj vendado de lerniloj. Kiel kutime, pleje impresis la kongresajn delegitojn SAT-literaturo; ĉirkaŭ tridek delegitoj, plejparte prezidantoj kaj funkciuloj de guberniaj kaj distriktaj Sindikat-komitatoj abonis la lernogazeton "Esperanto Hejme" kaj aniĝis al SEU, promesinte plej vigle propagandi la lingvon inter instruistoj de sia sindikato.

*Samara.* La SAT-grupo estas la kerno de nia rondeto esp-ista en la klubo de fervojistoj. Ĝenerale nia grupo kalkulas 30 anojn kaj kunvenas dufoje ĉiusemajne. Krom tio dimanĉe ni kunvenas por lerni kantojn, deklami, sciiĝi pri teorio kaj historio de la movado. La grupo havas sian ĥoron kaj dramsekcion, ankaŭ murgazeton (3a n-o elironta). Formiĝas specialaj korespondaj grupoj.

*Semenovka* (Kremenĉug-distr.). Ĉe la "Vilaĝana Domo" (Selanski Budinsk) fondiĝis esp-rondeto. Gvid. k-do Vetkin.

*Tiflis.* Organiziĝis Esp-ista grupo ĉe la fervojista klubo je la nomo de Orĝonikidze. Partoprenas 25 k-doj. Funkcias 3-monata kurso de Esp-o.

*Umanj.* Funkcias Esp-kursoj ĉe la loka laborista klubo (15 part.), ĉe la 5a laborlernejo (25 part.), ĉe la 7a laborlernejo (40 part.) kaj ĉe kooperativa lernejo (30 part.).

*Voroneĵ.* Laboro de esp-istoj en V. komenciĝis en fino de majo 1924. Unue ekzistis nur malgranda studrondeto. Sed antaŭ 1. sept. estis organizita jam Voroneĵa Urba Societo Esp-ista, kun 15 anoj. Esp-ista vespero aranĝita en klubo je nomo de Karlo Marks altiris pli ol 200 ĉeestantojn. Pri tiu sukcesa propagandvespero aperis notoj en lokaj gazetoj. Ĝi allogis multajn personojn al studo. Dum la festo de Oktobra Revolucio esp-istoj partoprenis demonstracion de sindikataj org-aĵoj kun esp. standardo. Dum la vespera soleno (ĉeestis pli ol 2000 p.), estis de ni prezentitaj en esp. "Internacio" kaj "Marŝo de laboristoj". Per pli forta agitado kaj raportoj faritaj de k-do Djakov rezulte en nia societo nun partoprenas pli ol 250 p., i. a. taĉmento de pioniroj (kom. infanaro) 75 p. kaj du rondetoj en du lernejoj de dua ŝtupo. La propagando estas nun transportita al tuta gubernio. El div. provincurboj kaj malproksimaj vilaĝoj ni nun ricevas petojn pri informoj kaj provizado per lernolibroj. Vasta korespondado estas aranĝita. Ĉiuj skribemuloj turnu sin al adr.: *Voroneĵ,* Klubo je nomo de K. Marks, Voroneĵa Urba Societo Esperantista. *4000.*

# KORESPONDADO

## TARIFO

**Korespondado: Unu enpreso:** Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

*MALLONGIGOJ:* L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la **devon, nepre** respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

**Bulgario**

— K-do *Ivan Ivanov,* instruisto en v. *Dolno-Suvanli* ĉe Ortakjoj, pri div. temoj, k. ĉ. l.

— K-do *Konstantin Kolev, urbo Ortakjoj-Drabiŝna,* dez. koresp. pri div. temoj, interŝ. vidaĵojn, fot-aĵojn k. Pl. k. ĉ. l. Ĉiam resp.

**Ĉekoslovakio**

— K-do *Rudolf Linke, Finkendorf 60,* Post Ringelshain, dez. koresp. kun lignaĵistoj k. ĉ. l.

— K-do *Vencelo Burghardo, Tannwald, n-o 109,* dez. koresp. kun maristoj el ĉ. l. PI. PK. pri lab. kondiĉoj, certe resp.

**Germanio**

— K-do *Georg Kemethmüller,* Orffstr. 18, *Nürnberg,* serĉas koresp-adon kun Anglio (ankaŭ angle), Rusio, Francio kaj ekstereŭropo. Precipe pri sporto kaj lab. movadoj.

— K-do *H. Platiel,* Altstadt, 390/II. *Landshut i. Bay.,* veturos per tolboato al nia Viena kongreso. Eksterlanda k-do scianta naĝi estas invitata partopreni. Supozebla daŭro de l' veturado 5—6 tagojn. Li ĉiam volonte interŝ. L, PK, PI, bfl. k. ĉ. l.

— K-do *Herbert Hofmann,* magazenisto, Schisslerstr. 15, I. *Augsburg,* dez. koresp. pri div. temoj interŝ. vidaĵ-, art- kaj fotokartojn k. ĉ. l.

— K-do *Martin Riedel,* Moltkestr. 47, *Zwickau i. S.,* dez. koresp. L, PK, PI, k. ĉ. l.

— "Deziras interŝanĝadon de PM, k. ĉ. l. Sendu unue." Adr.: *H. Wolfschmitt,* Klenzestr. 99, I. r., *München.*

— K-do *H. C. Behrendt,* Hohlmannstr. 14, *Essen-Altenessen,* petas siajn koresp. ne koleriĝi pro nerespondo de iliaj leteroj. La kaŭzo estas malsano. Poste li respondos al ĉiuj.

**Polio**

— *Al ĉiu,* kiu sendos al mi PM de sia lando "kompleton" mi ankaŭ sendos kompletan serion da PM, el malnovaj kaj novaj de mia lando. Adr.: *Inĝeniero St. Kaluscha* str. Lubelska 33, *Radom.*

— K-do *H. Halpern,* Rynek 7, *Lublin,* serĉas gravajn gekorespondantojn, escepte Germ.

**Sovet-Unio**

— K-do *Aduev Aleksandro,* Polevaja 82, kv. 2, *Niĵni-Novgorod,* pri ĉiuj temoj, interesiĝas pri presado.

— K-do *Vŝivkov-Amurski,* Mal. Dmitrovka 12, Institut jurnalistiki, *Moskvo,* kun studentoj kaj laboristoj pri ĉ. t., k. ĉ. l.

— *Esperantista grupo* serĉas korespondantojn en la tuta mondo. Adresu: K-do *Prohorĉik Petro,* Novo-Romanovskij per 11, kv. 2, *Minsk.*

K-do *Efim Flejs,* Ukom R. K. P. u. *Slobodskoj,* Vjatka gub., volas koresp. nur kun eksterlandaj gekomunistoj, pri revolucia movado kaj praktikaj demandoj de partia lab.

— K-do *Hudobin Bazilo,* ul. Gogola 49, *Serdobsk,* Sarat. gub., k. ĉ. l. ĉiam resp.

— K-do *Ĵadko-Andreev,* P. St., Sjezĵinskaja, ul. 4/9, kv. 4, *Leningrad.* dez. koresp. pri laborkondiĉoj de neplenaĝuloj k. ĉ. l.

— K-do *Eĵov Johano,* Poŝtkesto 51, *Astraĥan,* kun geesp-istoj de la tuta mondo, PI, L, ĉiam resp.

— K-dino *Anna Kalinin,* Poŝtkesto 51, *Astraĥan,* kun geesp-istoj de la tuta mondo, PI, L, ĉiam resp.

— K-do *Mikaelo Pahin,* Poŝtkesto 51, *Astraĥan,* pri ĉiuj temoj, k. ĉ. l.

— K-dino *Ŝilova Varvaro,* Poŝtkesto 51, *Astraĥan,* pro malsaniĝo ne povas resp. al siaj koresp-antoj.

— K-dino *A. Jakovleva,* atentigas, ke ŝia adreso de nun estas: Poŝtkesto 667, *Moskvo,* kaj komunikas al siaj koresp-antoj, ke nun post resaniĝo ŝi resp. al ili ĉiuj.

— K-dino *Isaeva Dario,* Bolŝ. Pesoĉnaja ul., *Serdobsk,* Sarat. gub., PKI, interŝ. fotografaĵojn.

**Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas — Represo de artikoloj permesata nur, se oni citas la nomon de nia organo kaj sendas al Red. du ekz. de la represaĵo.**
**Jarabono:** **Argentino** 6 pesos; **Aŭstrio** 120000 kr.; **Belgio** 36 fr.; **Brazilo** 13 milr.; **Britio** 110 penc.; **Bulgario** 220 lev.; **Ĉekoslovakio** 60 kr. ĉ.; **Danio** 10 kr. d.; **Estonio** 650 mk.; **Finnlando** 70 mk.; **Francio** 35 fr. fr.; **Germanio** 8 mk. or.; **Hispanio** 13 peset., **Hungario** 8 kr. or.; **Italio** 36 lir.; **Japanio** 4.50 jen; **Jugoslavio** 130 din.; **Litovio** 16 lid.; **Nederlando** 6 guld.; **Norvegio** 14 kr. norv.; **Polio** 8 zlot.; **Portugalio** 40 esk.; **Rumanio** 350 lej.; **Rusio** 4 rubl. or.; **Svedio** 8 kr. sved.; **Svisio** 10 fr. svis.; **Usono** 2.50 dol. — **Ankaŭ** 1/4 **jare abonebla. Ponumera prezo:** 0.20 mk.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG